NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz.

Kunven-tago: Vendredo
☎: 94.416.44.92
☎(portebla):696.613.958
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

Normala jar-kotizo: 2.500 pesetoj/15 eŭroj **BBK-konto: 22-1800155-0**

SEPTEMBRO/OKTOBRO 2000









NI ADIAŬAS LA SOMERON.

Unu fojon plian nova somero forpasis kaj ni jam estas ekontaj komenci denove la laboron, sed porĉiam restos agrablaj memoraĵoj pri la E-aranĝoj ĵus finitaj, kiel la 2a Mediteranea E-semajno, kiu okazis julie en Valencio kaj kiun partoprenis niaj samgrupanoj Teodoro Ibáñez kaj Jesús-Miguel García. Al tio apartenas la ĉi supraj fotoj.

PRESENTADO DE LA LIBRO DE ALDECOA.

La 3an de Junio estis prezentita en Vitoria la libron pri kiu ni recenzis en la antaŭa numero de "Nia Ponto". Temas pri vere interesa libreto kun du rakontoj de unu el la ĉefaj vaskaj verkistoj de la postmilita generacio: la vitoriano **Ignacio Aldecoa Isasi** (Vitoria, 1925 – Madrid, 1969). Trilingva omaĝo (eŭske-hispane-esperante) al tiu homo, kies famo kreskas laŭ la jaroj paŝas. Nia amiko **Joxe Mari Sarasua**, unu el la kunlaborantoj, eŭskigis la duan rakonton, "Ĝis tag-mezo alvenos" kaj esperantigis la enkondukon. Aĉetebla en nia Grupejo, ĝi kostas nur **500 pesetojn**.

NOVA TRADUKO DE AITOR ARANA.

La fama eŭska verkisto kaj elstara esperantisto Aitor Arana faris la tradukon, al la eŭska, de la verko "El la vivo de bervala sentaŭgulo", kies aŭtoro estas Louis Beaucaire. La traduko estis farita rekte el la esperanta originalo.



REINHARD SELTEN EN BILBAO.

La nobel-premiito kaj aktiva esperantisto, Reinhard Selten, alvenis Bilbaon por partopreni la unuan tutmondan kongreson pri lud-teorio, kiun oni okazigis en la Fakultato pri Ekonomikaj Sciencoj, de la 24a ĝis la 27a de julio. Sur la foto, aperinta en la ĵurnalo "El Correo", li staras maldekstre.



NIA GRUPO EN LA AMASKOMUNIKILOJ.

* La 11an de julio, "El Correo Español-El Pueblo Vasco", la ĉefa ĵurnalo de Bilbao, publikigis tutpaĝan artikolon pri nia Grupo, ĝia historio kaj ĝiaj aktivaĵoj. La artikolo estis ilustrita per foto de la zamenhofa busto, kiu staras sur breto, kaj de la tri anoj, kiuj informis la ĵurnalistinon, nome, Patxi de la Hoz, Cristina Carcedo kaj Jesús-Miguel García.

* La 21an de junio, la sama ĵurnalo, sub la rubriko "¿Quiénes son?" ("Kiuj estas?"), dediĉita al la diversaj asocioj de Bilbao, publikigis mallongan recenzon pri nia asocio. Ĝi estis sendita de nia samideano Jesús-Miguel García, pere de Interreto.

* La 6an de septembro, niaj samideanoj Eduardo Larrouy kaj Jesús-Miguel García partoprenis programon de la loka televid-stacio "Bilbo-Visión", kie ili havis la okazon diskonigi Esperanton Inter la bilbaoanoj kaj, samtempe, propagandi la komencontajn E-kursojn.

KRISTNASKA LOTERIO.

Kiam vi ricevos ĉi tiun "Nia Ponto"-n preskaŭ certe jam estos pretaj la kvitancoj por disvendi la ĉi jaran kristnaskan loterion. Memoru ke lastatempe la Grupo estas **malfermita nur la vendredojn**, do nur tiun tagon vi povos aĉeti ilin. Ju pli frue ni komencos la vendadon, despli da mono ni atingos.

Ĉiu kvitanco kostas 300 ptojn. kaj per ĝi eblas ludi 250 ptojn.Tiuj, kiuj deziros ricevi loteri-kvitancojn per poŝto, devos aldoni 300 ptojn. Por pagi la sendo-kostojn.

LOTERÍA DE NAVIDAD.

Cuando recibas este número de "Nia Ponto", los billetes de lotería ya estarán listos en el Grupo. Recuerda que, últimamente, **sólo abrimos los viernes**, por lo que tan sólo ese día podrás comprar o recoger talonarios para su venta. Contamos con tu colaboración.


Como siempre, cada papeleta cuesta 300 pts. y con ella se juegan 250. Los que deseen recibir lotería por correo, deberán añadir 300 pts. para gastos de envío.

. **Estimad@ soci@: Si a la izquierda de estas líneas encuentras una "X", es que aun no has pagado tu cuota correspondiente al actual año 2000.**

KURSFINA FESTO EN NIA GRUPEJO.

Kiel anoncite, la pasintan vendredon 30an de junio ni okazigis modestan festeton ĉe nia grupejo okaze de la fino de la kurso 1999/2000. Malgraŭ ke dum ĝi ni ne kapablis altiri novajn gelernantojn kaj, sekve, ne eblis organizi elementan kurson de Esperanto, la kunvoko ebligis kunsidon de niaj asocianoj; ĉirkaŭ tablo plenplena de diversaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj, vigle ili babilis kaj adiaŭis ĝis la reveno, post la somerferiado.







PREZENTADO DE E-LIBRO DE BERNARDO ATXAGA.

La pasintan 31-an de Marto, en la libro-vendejo "Axular" de la urbo Vitoria-Gasteiz, tiel kiel ni jam informis, okazis prezentado de la eŭska versio de la fama romano "*Behi euskaldun baten memoriak*" ("Memoraĵoj de eŭska bovino"). La aŭtoro, Bernardo Atxaga, tre fama eŭska verkisto, kaj la tradukinko, Aitor Arana, ne movadano, sed elstara esperantisto kaj eŭska verkisto, ĉeestis la eventon.

Ĉar antaŭe ne eblis al ni montri la fotaĵojn faritajn, jen ili nun: Sur la unua, nia amiko Patxi de la Hoz petas, al Bernardo Atxaga, ke li subskribu ekzempleron. Sur la dua, la aŭtoro pozas kun vaskaj esperantistoj (maldekstre-dekstren, JM Sarasua, "Txopo", P. De la Hoz, N. Gil, A.. Arana, M. G. Aduriz, B. Atxaga, E. Larrouy kaj JM García, kiu kaŭras).





E-ARANĜOJ.

30-7 Oktobro 2000. La "8a Internacia E-Semajno de la Kulturo kaj Turismo" okazos, de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro 2000 en la urbo Blanes, provinco Girona (Katalunio-Hispanio). Pliajn informojn ĉe: H.F.E.A.. Apartado 15027. 08080-BARCELONA. Tel.: 937275021 kaj 937836511. Faksilo: 937836511. Retadreso: luis_serrano@mixmail.com

Dec. 2000. 17-a IF jarfine en Germanio. IF ofertas specifan programon por mezaĝuloj ("dua generacio", 25 - 55 jarojn aĝaj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. Jam nun aligxis 149 personoj el 15 landoj.

Okazos en la 2000-jara Trier, la plej malnova urbo en Germanio.

Prelegos i.a. prof. Frank (DE), Lindstedt (FI) kaj Wandel (IL), d-roj Barandovska (DE) kaj Corsetti (IT). Paralele al la prelegoj okazos kursoj kaj urbaj promenoj.

La paralela junulara aranĝo IS (Internacia Seminario) okazos samtempe, sed ne samloke.

Pliajn informojn petu ĉe la IF-organizanto:
Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germ.
Tel. +49-5624-8007, retposxto: HDP@internacia-festivalo.de
Interreto: www.internacia-festivalo.de

26-28 Junio 2001. Kongreso de Hispana E-Federacio. San Javier (Murcia).

14-19. julio 2001. 11-a Internacia Esperanto-Kongreso Cheste-Valencio,
Inf: Monda Turismo

14-20. julio 2001. 74-a Kongreso de SAT en Nagykanizsa, Hungario.
Inf: Szabadi Tibor, Rete: esptibor@egon.gyaloglo.hu

21-28. julio 2001. 86-a Universala Kongreso de Esperanto, Zagreb, Kroatio.

01-08. aŭgusto 2001. 57-a IJK en Strassbourg, Francio.
Inf: http://www.esperanto.org/ijk2001

DENOVE, DELEGITO DE UEA EN BILBAO.

Post kelkaj jaroj dum kiuj ne estis delegito de UEA en Bilbao, en la Jarlibro 2000, nia urbo aperas denove. La nova delegito (kaj fakdelegito) estas Jesús Miguel García Iturrioz.

LITEROFTECO.

La ofteco de la literoj en Esperanto laŭ studo farita de Ottó Haszpra (Hungario), profesoro de la Budapeŝta Teknika Universitato, kiu ekzamenis tekstojn kun ensume 496.196 literoj. La relativa ofteco de Esperanto-literoj estas:

a	12,6 %
e,i,o	9 %
n	7,8 %
l	6,2 %
r,s	5,9 %
t	5,5 %
k	4,2 %
u	3,4 %
d,m	3,1 %
p	2,8 %
j	2,7 %
v	1,9 %
g	1,3 %
h	1,2 %
f	1,1 %
c	0,8 %
ĉ,ĝ	0,7 %
z,ĥ,ŭ	0,5 %
ŝ	0,2 %
ĵ	0,1 %



Kiel vi povas konstati, surprizoj ne mankas. Interalie, la ĉapelitaj literoj troviĝas ĉe la lastaj lokoj de la listo, malgraŭ ilia okulfrapa ĉeesto en la E-tekstoj.

("Eventoj". N-ro 0190. 2/julio-2000)

Ne forgesu ke komence de oktobro startos elementa kaj konversacia kursoj en nia grupejo. Via ĉeesto kaj helpo por propagandi ilin ĉiam estas bonvenaj. La gvidanto estos **Iñaki Vélez**.

Kaj de marto ĝis junio 2001 estos E-kurso en la Vaska Universitato, jam oficiale agnoskita kiel elektebla studobjekto, kun akademia valoro de 4,5 "kreditoj", t.e., 45 horoj. Gvidantoj estos **Jesús-Miguel García** kaj **Miguel Gutiérrez Adúriz**.

LA RANO

Iam en tre fora lando vivis belega princino. Ŝi loĝis kun siaj gepatroj, la reĝo kaj reĝino, en granda impona palaco, kiu ĥais mirindajn ĝardenojn. Tie, dum la longaj sunbrilaj someraj tagoj, ŝi ludis sole, ĉar ne ĥais gefratojn.

Iun tagon, ŝi sidis apud lageto kaj ludis per malgranda ora pilko; ĵetis ĝin en la aeron., ĝin kaptis, reĵetis, kaptis, reĵetis ... sed subite ŝi fuŝis kaj la pilko falis –PLAŬD- en la akvon.

La princino ekploris, ĉar ŝi ŝategis la oran pilkon, sed tiam ŝi aŭdis flustrantan voĉon apud ŝia orelo:

"Se vi kisus min, mi trovus vian pilkon kaj redonus ĝin al vi".

La princino turnis la kapon kaj preskaŭ kriegis, kiam ŝi vidis aĉan verdan ranon, kiu sidis sur muro apud ŝi. Tuj ŝi rememoris fabelon, kiun ŝi aŭdis kiam estis juna knabino.

"Ho, -ŝi pensis- tiu malbelulo devas esti sorĉita princo. Mi devos kisi lin kaj tuj poste, li reiĝos bela juna viro, ni enamiĝos, geedziĝos kaj kunvivos feliĉe por ĉiam kaj eterne".

Ŝi decidis fari la malagrablan taskon rapide, do fermis la okulojn kaj kisis la ŝliman verukan haŭton de la amfibio. Ne ekbrilis, ne ekbruis, kaj kiam la junulino malfermis la okulojn, restis sur la muro ankoraŭ la rano.

"Kio okazis? –kriis la princino-. Nun vi devus esti en via propra formo denove!. Nun vi devus esti mia princo!".

La rano nur ridis kaj diris: "Oni devas kisi multajn ranojn antaŭ ol trovi sian princon".

Janet Tidman, el Anglio (pere de Ilona Fedor (Hungario)).

KIO ESTAS SUKCESO?

- En 4 jaroj sukceso estas se vi ne pisas en pantalonojn.
- En 12 jaroj sukceso estas se vi havas amikojn.
- En 20 jaroj sukceso estas se vi povas havi sekson.
- En 35 jaroj sukceso estas se vi havas bonan salajron.
- En 60 jaroj sukceso estas se vi povas havi sekson.
- En 70 jaroj sukceso estas se vi havas amikojn.
- En 80 jarojsukceso estas se vi ne pisas en pantalonojn.

("Eventoj". Nro. 0192. 1/sept.-2000)